WIKIPEDIA

Geeza lingvo

Por la geeza (etiopia) alfabeto, vidu sub Etiopia skribo

Geeza lingvo (propraskribe ግዕዝ elp. ɣɨʕɨz ; ankaŭ literumata *Ge'ez*, *Gi'iz*, *Gy'yz*, *Gə'əz* ktp) estas antikva semida lingvo de la regiono nun konsistanta el Eritreo kaj la norda parto de Etiopio, kiun plej multaj homoj malfacile komprenas, ne nur en Oromio sed tra tuta Etiopio[1].

Ĉirkaŭ la 3-a ĝis la 6-a jarcentoj p.K. la geeza lingvo fariĝis la oficiala lingvo de la Reĝlando de Aksumio kaj de la etiopia imperia kortego. La geeza ŝajne ĉesis esti la kutima lingvo de la komunumo ĉirkaŭ la 14-a jarcento, kaj hodiaŭ restas uzata nur kiel liturgia lingvo de kelkaj kristanaj kaj judaj grupoj.

La geeza lingvo havigis al si fruan abugidan skribsistemon, kiun ĝi heredigis al la amhara kaj tigrinja kaj diversaj aliaj lingvoj de Etiopio kaj Eritreo.

geeza	
ግዕዝ	
Parolata en	Etiopio
Denaskaj parolantoj	mortinta (uzata nur en liturgio)
Skribo	Etiopa skribo
Lingva statuso	6 formortinta
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	gez
ISO 639-3	gez
SIL	GEZ (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=gez)
Glottolog	geez1241
Angla nomo	Ge'ez
Franca nomo	ge'ez

Enhavo

Fonologio
- Vokaloj
- Konsonantoj

Vidu ankaŭ

Referencoj

Fonologio

Vokaloj

- a [æ], poste *e < Prasemida *a
- u [u:] < Prasemida *ū
- i [i:] < Prasemida *ī
- ā [a:], poste *a < Prasemida *ā
- e [e:] < Prasemida *ay
- i [i] < Prasemida *i, *u
- o [o:] < Prasemida *aw

(*ankaŭ skribataj kiel* ă, û, î, â, ê, ĕ, ô)



Bildo de la Virgulino Maria kun sia filo en geeza manuskripto ĉirkaŭ la jaro 1875.

Konsonantoj

Geezaj konsonantoj havas trioblan kontraston inter senvoĉaj, voĉaj, kaj glote emfazaj. La prasemida "emfazo" en la geeza estas ĝeneraligita por inkluzivi emfazan p. La geeza estas la sola semida lingvo, kiu foneme distingas inter [p] kaj [f]. Ĝenerale diri, inter la semidaj lingvoj la geeza estas relative konservativa rilate al fonologiaj ŝanĝiĝoj.

Vidu ankaŭ

- Amhara lingvo
- Oroma lingvo

Referencoj

1. ↑ (en) Endalk, *A proposed administrative shift in the Ethiopian Orthodox Church stokes ethnic, religious tensions, (https://globalvoices.org/2019/09/13/a-proposed-split-in-the-ethiopian-orthodox-church-stokes-ethnic-religious-tensions/)* Global Voices, la 13-an de septembro 2019, alirite la 9-an de oktobro 2019

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Geeza_lingvo&oldid=6827350"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 05:49, 6 jan. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.